Estimataj membroj,

Vi povas legi en ĉi tiu numero, ke niaj najbaroj Ontariaj organizas la unuan Ontarian Kongreson de Esperanto, inter la 3-a kaj la 5-a de julio 1987, en Waterloo. Laŭ mi, tio estas esperdona informo. La Kebekia movado tiel paŝis en septembro 1982 kaj rezultis el tiu kunveno nova energio kaj emo al konkreta poresperanta agado en nia provinco. La rezultoj estas videblaj diversmaniere (kaj baldaŭ diversloke...) kaj estus tro longe citi ilin nun. La estraro de ESK estas laborestraro, kiu kunvenas ĉiumonate por raporti pri la farintaĵoj kaj plani kaj decidi novajn farindaĵojn.

Laŭ mi, la Jubilea Jaro estas taŭge organizita en Kebekio ĝuste dank'al la ekzisto de nia Societo. En ĉi tiu *La Riverego*, vi povas legi pli pri la Jubileaj projektoj. Mi fieras ankaŭ atentigi vin ke, en 1987, ESK festos sian 5-an datrevenon.

Finante, mi volus danki ĉiujn, kiuj kunlaboris, helpis aŭ kontribuis iamaniere al la bono de ESK. Mi ankaŭ profitas la okazon por deziri al vi ĉion bonan dum la Jubilea Jaro 1987.

Plej sincere via,

P.S. Viaj komentoj kaj ideoj estas daŭre bonvenaj.
Ĝis baldaŭ.

En Montréal

# Esperanto aŭtobusos

Normand Fleury, prezidanto de ESK, antaŭnelonge havis mirindan ideon por propagandi Esperanton. Li estis rimarkinta, ke multaj senprofitcelaj (kaj malriĉaj) organizoj reklamadas en la aŭtobusoj de la Montreala urb-komunumo. Post esploro, li lernis, ke tia reklamado estas senpaga. Sed, por uzi tiun servon, necesas bona motivo.

Tamen, ni devas pagi por presigi la plastajn afiŝojn kaj por la dismetado de ili en la aŭtobusojn. Pagi almenaŭ 2.000$, eble ĝis 3.000$. Sed tiu sumo estus por 800 afiŝoj, videblaj de centmiloj da homoj, dum la tuta Jaro Jubilea!

Ni petis monon de kelkaj Esperantistoj, kaj tiel akiris jam iom pli ol 500$. ESK kontribuos per sia ĝenerala kaso, kaj verŝajne ankaŭ la Montreala Klubo. Sed ni tamen bezonas multan monon. Ne hezitu donaci.□

# ZONE LIBRE

Dum la tuta Jubilea Jaro, estos artikolo pri Esperanto en la revuo *Zone libre*. *Zone libre* estas Kebekia porpaca revuo, kaj aperas dumonate. Louis Langlois, membro de ESK, estas nun membro de ĝia *Collectif de direction* por ESK.

La afero komenciĝis, kiam Normand Fleury sendis al *Zone libre* tekston (ĝi aperis en la septembra numero) pri sia vojaĝo en Sovetunio. Temis pri paca aranĝo, sekve la afero tute taŭgis por porpaca revuo. Kaj tiel eblis paroli pri Esperanto. Tiu artikolo impresis membrojn de la *Collectif*, kiuj petis pluan kunlaboradon.

Kebekiajn mezlernejojn, ĉar ĝia enhavo utilas al eduko pri paco. La stabo de *Zone libre* ankaŭ zorgas pri programo ĉe Montreala komunuma radiostacio, ĉiun duan semajnon.

Ni forte invitas ĉiujn ESK-anojn aboni la revuon, kontraŭ 15$ jare. Sendu vian nomon al *Zone libre*, 5363, av. du Parc, Montréal, H2V 4G3.□

## Paĝindikile

Por la Jubileo, ESK eldonos paĝindikilojn, kun franclingva teksto pri Esperanto: *Espéranto: le monde en parle depuis 100 ans*. La celo estas disdoni ilin ĉie tra Kebekio, per la librovendejoj. Ni baldaŭ havos por disdonaci 6.000 paĝindikilojn. Do, se vi vizitadas librovendejojn, kies deĵorantoj aŭ posedanto akceptus disdoni ilin, kiel oni ofte faras, metante ilin en la ĵus aĉetitaj libroj, ne hezitu peti stoketon da paĝinidiloj al ni.□

## VARBU

ESK organizas konkurson por siaj membroj. Vi certe scias ke tiuj homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, povas fariĝi *Amikoj de Esperanto*, kontraŭ du dolaroj jare. Ili ricevas, tri fojojn en jaro, *Nouvelles sur l'Espéranto*, informbultenon franclingvan pri la movado, Kebekia kaj tutmonda. Nun estas 19 *Amikoj de Esperanto*.

La konkurso estas do por varbi novajn Amikojn. Tiu ESK-ano, kiu varbos plej multajn, gajnos 25$ por aĉeti ĉe la Libro-Servo de la Kanada Esperano-Asocio. Ne forgesu peti viajn (certe) multnombrajn varbitojn, ke ili menciu, ke ilin varbis vi. (Ne partoprenas la estraranoj. La gajnanto estu varbinta almenaŭ kvin novajn Amikojn. Okaze de egalo, oni dividu la premion.)

Fine de la jaro, la estraro premios la gajnanton.□

## SERĈATAJ mortaj aŭ vivaj

Por plenumi ĉiujn ideojn pri Jubileaj projektoj (eĉ nur la bonajn), kiujn pripensis la membroj de ESK, la Societo bezonas multajn kunlaborantojn, pretajn doni iomete da sia tempo kaj lerto. Poste estos 99 jaroj por ripozi ĝis la venonta Jubileo...

- Ni volas organizi, pere de Esperanto, Ekspozicion de floraj bildkartoj tutmondaj en *Le Jardin Botanique de Montréal*. Tiel oni povas montri la utilecon de Esperanto. *Le Jardin Botanique* jam konsentis pri la projekto, kaj ni povus facile havigi al ni la bildkartojn, sed ni NEPRE bezonas homojn, esperantistajn aŭ ne, kiuj pretus munti, profesie, tian ekspozicion.

-Estus bone, se urboj donus al stratoj la nomon *Esperanto*, aŭ eble ankaŭ *Zamenhof*. Stratoj *Esperanto* jam ekzistas en Trois-Rivières kaj Sainte-Foy. Sed ni bezonas, ke iu verku informdosieron, por sendi, kun enkonduka letero, aŭ eĉ persone porti, al la urbaj instancoj. Iu devas okupiĝi pri tio.

-Estus ankaŭ bone, se fakaj revuoj aperigus artikolojn pri Esperanto. Sed pri tio ĉiuj membroj respondecas. Kontaktu la revuojn, kiujn vi ricevas, kaj proponu artikolojn al ili. Preskaŭ ĉiam eblas ligi la temon de la revuo kun Esperanto. Ekz., Normand Fleury sendis artikolon al porpaca revuo: tio naskis kunlaboron inter ESK kaj la revuo.

Se vi pretas helpi al iu ajn projekto, bv. kontakti ESKon. Ni kore akceptos vin. Vi ankaŭ povas kontakti nin, kompreneble, se vi bezonas helpon, por, ekzemple, verki artikolon. Aŭ se vi havas novan ideon.□

# Maskuta Kunveno

En Maskuto (Saint-Hyacinthe), de la 17-a ĝis la 19-a de aŭgusto 1987, okazos komuna kongreso de ESK kaj de la Kanada Esperanto-Asocio. Apud la jarkunsidoj de la du asocioj, okazos aliaj distraj aranĝoj.

La kotizo inkluzivas la programerojn tagajn kaj vesperajn kaj la urban viziton dimanĉe matene. Ĝi ne inkluzivas loĝadon, manĝon kaj bankedon.

20$ ĝis la fino de marto
25$ ĝis la 15-a de junio
30$ post la 15-a de junio aŭ ĉe la kongreso.

Infano akompanata de plenkreskula kongresanto NE PAGAS se ĝi estas malpli ol 12-jaraĝa je la 17-a de julio 1987.

LA ALIĜILOJ KUN PAGO DEVAS ATINGI LOUISE LABELLE ANTAŬ LA LIMDATOJ.

Bankedo okazos sabate je la 18-a horo en la hotelo *Auberge des Seigneurs*. Ĝi kostas 18$ (ĉio inkluzivita) kaj ne estas deviga: ĝi estas aparte mendebla.

Loĝado eblas en la hotelo en kies salonoj okazos la kongreso, *Auberge des Seigneurs*. Taga prezo por ĉambro: por unu persono, 74$, por du, 84$. Se ni mendas almenaŭ 30 ĉambrojn, la prezoj malaltiĝos je 25$, sekve 59$ kaj 69$.

Tuj najbara hotelo estas malpli kosta kaj same taŭga: *Motel Le Dauphin*. Taga prezo por ĉambro: por unu, 45$; por du 50$; por tri, 55$; por kvar, 60$. Ambaŭ tiuj-ĉi hoteloj situas proksime al la elirejo de la aŭtovojo. Dudek minutoj sufiĉas por atingi al urbocentron paŝe. Aliaj hoteloj, malpli multekostaj, elekteblas por tiuj, kiuj ne nepre deziras esti surloke. Ĉiu devas mem zorgi pri sia loĝado. Jen la adresoj de la proponitaj hoteloj:

Auberge des Seigneurs
1200, boul. Daniel-Johnson
Saint-Hyacinthe J2S 7K7
(514) 774-3810

Motel Le Dauphin
1250, boul Daniel-Johnson
Saint-Hyacinthe J2S 7K7
(514) 774-4418

Ni invitas la ESK-anojn prepari ĉiajn programerojn, por la du distraj vesperoj. Ĉu skeĉoj, teatraĵetoj, kantoj aŭ muziko, aŭ alia, ĉio bonvenas. Sed bonvolu kiel eble plej frue anonci vian projekton al ESK.

| | | |
|---|---|---|
| Vendrede | | |
| | 19h | malfermo kaj salutoj |
| | | interkona distra vespero |
| sabate | | |
| | 9h30-12h | jarkunveno de KEA |
| | 14h-17h | konversacia rondo, oratora konkurso, |
| | | prelegoj, k.t.p. |
| | 18h | bankedo |
| | 20h | vespero bale finonta |
| dimanĉe | | |
| | 9h30-12h | perbusa urba vizito |

Ni sukcesos iam ŝovi la ESK-jarkunsidon en tiun programon.

Por aliĝi, sendu vian nomon kaj pagon rekte al Louise Labelle. Indiku se vi volas aliĝi la balon. Ankaŭ indiku kiom la malpli ol 12-jaraĝaj infanoj venas kun vi. Faru vian ĉekon al Esperanto-Societo Kebekia.

Kanada kongreso de Esperanto
Louise Labelle
10617, av. Oscar
Montréal-Nord, H1H 5J8

# Mallonge

## Demisie

Jeff Brower, estrarano de ESK ekde la fondiĝo de la Societo, demisiis pasintan decembron, pro personaj kaŭzoj. Li jam estis sekretario, kaj vicprezidanto de ESK. La estraro de ESK nun aktive serĉas anstataŭanton al Jeff; tiu nova estarano deĵoros ĝis la elektoj, dum la Maskuta kunveno □

## Ontarie

Ontaria kongreso de esperantistoj okazos de la 3-a ĝis la 5-a de julio 1987, en Ŭaterluo (Waterloo), en la universitato Wilfrid Laurier. Ĉiuj estas bonvenaj, kaj estos turisma vizito. Pliajn informojn oni petu de Manŭelo Kampanjaña, Leterfako 80, stacio B, Otavo, Ontario, K1P 6C3. Sendu afrankitan koverton.□

## Emistudio

ESK aĉetis akciojn en la societo Emistudio, de Brita Kolumbio. Emistudio eldonas Esperantaĵojn, i.a. diskojn, kaj jam faris diskojn kun la kantoj de Joëlle Rabu. Pri tiu societo multe okupiĝas Wally kaj Olga Du Temple. Per tiu aĉeto (100$), ESK (esperereble) profitos kaj helpos al la kresko de la Esperanta kulturo.□

## Memuare

La tiurilata laboro progresas. Ni presigis 100 pliajn ekzemplerojn kaj ŝanĝis kelkajn paĝojn en la malnovaj, por adapti ilin al ilia nova celo, la lernejaj instancoj. Ni baldaŭ dissendos ilin.□

## 1988

La estraro de ESK decidis ke, ekde 1988, ESK eldonu nur unu organon, saman por la esperantistaj membroj kiel por la Amikoj de Esperanto. Ĝi estos do parte franclingva, parte Esperantlingva. Tiel la Amikoj povos vidi "veran" Esperanto-revuon kaj veran Esperanton. Kaj ni povos kunigi la fortojn kaj eldoni pli altkvalitan revuon.□

Mi deziras abonigi la jenajn personojn al:

*La Riverego*, 5$ ○ ; *La Riverego* aere, 6$ ○

*Nouvelles sur l'Espéranto*, 2$ ○.

Nomo: ______________________

Adreso: ______________________

______________________

---

*La Riverego*, 5$ ○ ; *La Riverego*, aere, 6$ ○

*Nouvelles sur l'Espéranto*, 2$ ○.

Nomo: ______________________

Adreso: ______________________

______________________

---

*La Riverego*, 5$ ○ ; *La Riverego*, aere, 6$ ○

*Nouvelles sur l'Espéranto*, 2$ ○ .

Nomo: ______________________

Adreso: ______________________

______________________

Mi deziras mendi Jubileajn pingloinsgnojn.
Prezo: 1$, 10 aŭ pli: po 0,70$, plus sendokostoj
Mi pagos la recevitan fakturon.

Kvanto: ____

Dorse de tiu ĉi lasta paĝo, vi trovos abonigilojn kaj mendilon, por pingloinsignoj. Pingloinsigno estas tre bona maniero reklami pri Esperanto dum al Jubilea Jaro. *La Riveregon* vi povas sendigi, ekzemple, al korespondantoj. Se vi havas amikon, kiu interesiĝas pri Esperanto, sendigu al tiu *Nouvelles sur l'Espéranto*. Tiu iĝos *Amiko de Esperanto*.
Por abonigi, bv. tuj sendi ĉekon. Por la pingloinsignoj, bv. atendi fakturon. Dankon.□


Société québécoise d'Espéranto
C.P. 126, succ. Beaubien
Montréal, Québec
H2G 3C8

# la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de Esperanto-Societo Kebekia

Januaro 1987. Numero 5-a. Jarkolekto 2-a




Jubileaj projektoj

Nu, jam komenciĝis la Jubilea Jaro de Esperanto, kaj tiu ĉi bulteno svarmas je projektoj ESKaj rilate tiun eventon. Plej multaj projektoj celas reklamadon pri Esperanto al la ĝenerala publiko.

Sed ni ne forgesu, ke ESK ne nur estas ĝia estraro, sed la tuta membraro, kaj ni bezonas ĉies helpon por antaŭenigi niajn projektojn.

Vi ankaŭ trovos ĉi-numere multajn informojn pri la venont-julia renkontiĝo, en Maskuto. Mi esperas, ke ĝi estos amasa kaj sukcesa.

Sed mi ankaŭ ŝatus scii, kia vi taksas tiun bultenon. Mi ricevis preskaŭ neniun reagon (nek kontribuaĵojn, kiel kutime), kaj mi eĉ ne scias, ĉu la membroj de ESK legas *La Riveregon*. Kiel oni povus ĝin plibonigi? Pri kio mi skribu en ĝi?

Kaj ĉu entute utilas havi societan revuon? Ĉu ĝi ne estas nur malŝparo da mono kaj energio? Kaj mono kaj homfortoj estos tre bezonataj ĉi-jare.

Kompreneble, mi scias, ke neniu (aŭ preskaŭ) respondos al tiuj demandoj, sed mi tamen esperu.

Saluton.

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'Espéranto.

*La Riverego* estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. ISSN 0830-9574

Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Redaktoro: Sylvain Auclair

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5$; aerpoŝte: 6$. UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,50$, plus sendokostoj.

Adreso: Société québécoise d'Espéranto
C.P. 126, succ. "Beaubien"
Montréal, Québec
KANADO H2G 3C8 telefono: (514) 495-8442